


AMERIKA ESPERANTISTO



# AMERICAN ESPERANTO MAGAZINE

*A Complete Esperanto  
Library in America*

*La Deveno de la Virino  
Hinda Legendo*

*Guatemala Esperantists  
Visit the USA*

*La Kanto pri Hiavata  
H. W. Longfellow*

**2**

**1960**



# AMERICAN ESPERANTO MAGAZINE

Official publication of the  
ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA, Inc.  
114 West 16 St., New York 11, N. Y.

Central Office: Doris T. Connor, George Alan Connor, Myron R. Mychajliw  
Sustaining Board: Ralph H. Beard, Dr. Luella K. Beecher, A. M. Brya,  
C. Cummingsmith, Dr. Lee-Min Han, Austin Herschel, Anonymous, Allan  
Hutcheon, J. Archie Johnson Jr., Paul J. Kovar, Bertha E. Mullin, Anon-  
ymous, Bertha F. Sloan, Harold S. Sloan.

---

## "Heroldo" Rifuzas Presi la Jenan Veron Pri Ruzaĵo de Doneis Rilate al "Unueco"

Al Heroldo: "Sub titolo 'Klopodoj provizore malsukcesis', Heroldo, 16 jan. 1960, presis tre erarigan 'informon' de S-ro Doneis, prez. de ELNA, ke 'La Unuiga Komitato de ELNA ricevis la 21an nov. 1959 la informon de EANA, ke la estraro de EANA malakceptis la proponon pri reunuigo, kiun bonfide prezentis ELNA dum sia kongreso en St. Louis pasintan julion'. La vero estas, ke nek la estraro nek iu ajn en EANA havis ian ajn kontakton, je iu ajn dato, kun tiu unuflanka 'komitato' en la ELNA kongreso, - t.e., nek antaŭ, dum, aŭ post tiu kongreso. EANA partoprenis nur en la ambaŭflanka originala komitato, kun reprezentantoj egalnombre de kaj EANA kaj ELNA. Pri 'malakcepto', estis la proponoj de ĝiaj propraj reprezentantoj, kiujn ELNA malakceptis en sia kongreso. EANA ankoraŭ subtenas tiujn proponojn de la ambaŭflanka originala komitato."

Nota: Tion ni sendis al "Heroldo", kaj tion Jung rifuzis presi. Nur ruzaĵoj de ELNA trovas lokon en "Heroldo". Al honestaj Esperantistoj, ni petas, ke vi demandu ian ajn dokumenton de ELNA, kiu konstatas la "informon" de Doneis. Vi trovos, ke tute ne ekzistas io ajn tia. Nu! Ni jam delonge alkitimigiĝis al ruzaĵoj de radikalaj ruzuloj. Kompreneble temas nur pri la *estroj* de ELNA, kiuj rekte organizis la skismon antaŭ kelkaj jaroj. Kiel ni diris en la pasinta numero de AE, oni ne povas anticipi unuecon de politikaj ribeluloj kaj sociaj skismuloj. Klasbatalo ne kondukas al unueco. La solvo pri unueco restas en tio, ke la trompitaĵoj ne-radikalaj Esperantistoj simple aliĝu aŭ realiĝu al EANA sub la verda standardo, kaj ke la ribelaj elementoj en la estraro de ELNA iru aŭ reiru al SAT kaj maldekstraj partioj sub la ruĝa standardo, de kie ili devenis.

---

*Kovrilo: Indiana militdanco. "Kun militaj bataliloj, kun la haŭto ŝmirkolora."*

*"The Association will not knowingly admit as members persons who are Communists or Fascists or others who seek to overthrow the Government of, or in the interests of a foreign power seek to weaken, the United States, or to change its form of government by other than constitutional means." - EANA Constitution.*

Subscriptions in the United States and Canada: \$3.00 per year.  
Jarabono eksterlande por kalendara jaro: \$1.50 aŭ egalvaloro.  
Gratis to Members of the EANA.

Regular Membership in EANA - \$5.00 per year. Patron - \$10.00.  
H. S. or College Student & Armed Forces - \$3.00 per year.  
Sustaining Board - \$3.00 or more per month.

# AMERIKA ESPERANTISTO

Vol. 73

JUNIO 1960

N-ro 2

## A COMPLETE ESPERANTO LIBRARY IN AMERICA LIBRARY FUND

In the November-December 1958 AE, we printed a page entitled "For an American Esperanto Library", and announced the beginning of a *Library Fund* to which contributions, large or small, could be sent. We pointed out that *all* Esperantists regardless of affiliation (or non-Esperantists for that matter) who made direct contributions to the Library Fund, would be entitled to the privileges of the Library and their names would be listed in perpetuity as founders of the Library. We are happy to report now that the "American Esperanto Library" is assured of complete success, and that the "Lending Library" part of the plan will be in operation in just a few short months now. The great complete "American Esperanto Library" will take several months more, but should be practically complete by the New Year. Over 2,000 titles have already been listed and packed in boxes. Of course there is much more to be done, and the Fund needs much more in the way of contributions to complete the job.

We have already discussed the need for a complete Esperanto library in the Western Hemisphere in the article mentioned above. We have taken the BEA Library, under the remarkable management of Montagu Butler, as the model to be followed. The BEA Library has taken many many long years to develop to its present point of excellence and completion, and we can not hope to attain to the same perfection short of a similar number of years of devotion and donation. But we can be proud of an excellent beginning. During the years we have collected books - early editions, many extremely rare items, long out-of-print books, unique and valuable finds, and of course all modern and presently available titles, every Esperanto book we could find anywhere. But the ultimate perfection of the Library depends on *YOU* and all other Esperantists in America - upon your devoted interest and your continued contributions to the Library Fund.

The accomplishments thus far are largely due to the support of many members of EANA who have contributed generously to the Fund. The need is for many more Esperantists to participate in the Fund. Each and every Esperantist should become a founder with as large a donation as possible, but even a *LOT* of small sums add up to a large amount. Let every Esperantist enroll and give something; it will all help. By way of an interim report on contributions thus far; those who have contributed from \$20 to \$100 or more: A. M. Brya, G. A. Connor, C. Cummingsmith, Esp. Society of N. Y., A. Herschel, A. H. Okun, C. S. Otto. Those who have thus far given smaller sums, which add up greatly *in toto*, and among which are a half dozen giving the good sum of around \$10 or so: Angela Alfaroli, J. Augustinius, P. Barbatsuly, R. Beard, Mrs. A. Berney, H. Bobus, N. Brokaw, G. Boulet, H. Carroll, R. Denison, Dr. Doczy, E. Fleming, E. Graf, J. Graves, Y. Gulsoy, Dr. Han, Lou Harrison, A. Hutcheon, Edith Kane, R. Lambert, D. Lewis, Eula Marks, Mary Marrett, R. Marzilli, W. Miernicki, R. Millikan, Arlie Nixon, G. Parker, A. Romito, G. Scofield, Rev. Sparks, J. Silverman, Wm. Vathis. Many have not as yet become acquainted with the Fund. Further contributions and any suggestions will be most welcome.

## ESPERANTO IN ACTION

**Greenfield and Springfield, Mass.**, and other near-by towns, continue to make Esperanto history, through the work of *David Garson* and *Warren Gould* in that area. Some 18 exhibits, radio programs, TV programs, and Esperanto courses attest to their competence in Esperanto promotion.

**Corpus Christi, Texas**, has a budding group of High School students who are taking up the study of Esperanto. This is largely due to the efforts of *Clif Barkley* and *Linda Davis*, young members of EANA.

**J. Henry Kruse, Jr.**, President of the Esperanto Association of New Jersey, Member of the Board of Directors and of the Central Committee of EANA, is soon to take up important work on the Pacific Coast. He goes to head orientation for the newly blind at the *Oakland Orientation Center for the Blind*. Henry himself is blind, but his capabilities as a lawyer, lecturer, scholar, etc., surpasses that of most seeing persons. He will be missed by a host of friends and associates on the East Coast. Various events were arranged to honor him and to bid him Godspeed. A special meeting of the ESNJ occurred May 6th at the YMCA in Orange, N.J., and a dinner was given in his honor on May 10th in Newark.

**St. Petersburg, Florida**, in the community of retired persons, has a devoted worker for Esperanto in the person of our esteemed member, *Mr. F. Lee York*, who organized a course in the YWCA there. The textbook used was "Esperanto: The World Interlanguage".

**Dr. Luella K. Beecher**, Lima, Ohio, is an outstanding Esperantist, and she is also a leader in the Baha'i movement. She headed the Esperanto Congress of EANA at Lima in 1938. She is a beloved leader in both movements; and her generous contributions to the Sustaining Fund of EANA put her at the top of the list of this important committee. The year 1960 finds her at the wonderful age of 92 years, and still healthy and happy in her endeavors. With affection and admiration we congratulate our *samideanino*.

**Miss Claudette Toro**, San German, Puerto Rico, utilizes Esperanto in many ways, including world-wide correspondence, although she is both blind and paralyzed. Her remarkable activities for her community won for her the award of the Rotarian Women of San German as the *San German Woman of 1959*. Hearty congratulations.

**Dr. John B. Rushing**, Houston, Texas, has made rapid strides in learning and using Esperanto. He plans medical articles and speeches in the interlanguage. Dr. Rushing has gained the *EANA Atesto pri Lernado* and goes on to win the final examination for *Atesto pri Kapableco*. His promotion of Esperanto among acquaintances and his planned contributions to medical literature in Esperanto are noteworthy elements for progress in our movement.

**Chunggu University, Taegu, Korea**, is perhaps the strongest center for Esperanto in Korea. Its President, *Prof. Hae Chung Choi*, is an accomplished Esperantist, and the interlanguage is taught by *Prof. Hengwi Hong* at the university. Incidentally, the son of President Choi, namely *Chaan-shik Choi* is a university student in New York City, and a member of EANA. Through arrangements with President Choi, EANA has sent hundreds of used Esperanto books, old and new, to aid in building a good sized Esperanto Library at the university. In the matter of some free books, we must give credit also to Dr. Lydia Allen DeVilbiss in this very worthwhile effort to re-establish an Esperanto Library in war-torn Korea.

**A successful Esperanto course** in Levittown, N.Y. (on Long Island), was completed this past semester, under the auspices of the Adult Education Division of the Public Schools of Levittown. *Joseph H. Gamble* taught the course, and his success is demonstrated by the request of the school authorities for another course there next Fall.

**In Trois-Rivieres (Three Rivers), Canada**, Esperanto is taught in the Diocesan Seminary by Brother Daniel.

**Frank & Virginia Hayden**, Springfield, Mass., sent clippings from local newspapers telling about Esperanto meetings in their home. *Warren Gould* gave instruction at these events. Mr. & Mrs. Hayden are doing wonders for Esperanto through their interest and the use of their home for classes.

**Mrs. Henry O. Glidden**, Abington, Mass., nee Jane B. Doughty, sends her renewal of membership in EANA – this is her tenth year as member – and tells of a trip to Europe beginning in May. She reports the death of *Donald D. Wyman* last December. Donald was the son of our beloved *Mrs. Flora Wyman*, who was active in Esperanto in the early days of its growth in and around Boston, and who died in 1954. Mrs. Glidden's mother was in the original Esperanto course given by Mrs. Wyman.

**Two anonymous donations to EANA:** Two devoted members of EANA give very helpful sums as Members of the Sustaining Board. They both wish to be known as "Anonymous". We are deeply indebted to these 'co-workers' for their help over the years. The sums for 1960 are \$250 and \$100 respectively. All Esperantists owe them a debt of gratitude.

**Rita Beukema is the name in Hollywood:** In the Mar-June AE, 1958, and the Nov-Dec AE, 1958, we announced under that title, a new record album of beautiful music, with the name "International Rendezvous", with 12 superbly recorded numbers played on piano and organ. One number was entitled "Secret Moments", by *Rita Beukema Martinez*, accomplished composer and Esperantist. A new album of 13 pieces has been issued, which includes her composition "Gypsy Love". The entire series of 13 numbers costs just \$4.14 postpaid from International Records, 6404 Hollywood Blvd., Hollywood 28, Calif. Or you may write us at EANA for details.

**Rev. Robert Sparks**, Avon, Conn., will close a year of teaching in far-away Zanzibar, off the east coast of Africa. He writes of having an Esperanto class of the top form of the school there. This class is on school time and is equivalent to being in the curriculum.

**Dr. Mario A. Agrait Marty**, San German, Puerto Rico, has brought a knowledge of Esperanto to many people in his area, among whom was Miss Claudette Toro, mentioned elsewhere in these items.

**International Pen Pal Ship Plan:** A brilliant young member of EANA, *Claremont F. Carter*, 7320 Biscayne Blvd., Miami 38, Florida, has won much recognition for his plan concerning Pen Pals throughout the world. He believes that brotherhood can be promoted through effective efforts among the youth of every nation for extensive intercorrespondence. Among the points in his program are (1) a special postage rate for international pen pal letters, (2) a UN agency to handle the correspondence, (3) travel reduction for international pen pals, (4) a regular pen pal program in the public schools. Many noted people have praised his efforts. Mrs. Eleanor Roosevelt has written a syndicated article about his plan. And youthful associates in Miami and elsewhere help advance the plan. Those interested in his endeavors may write to him at the above address.

## LA DEVENO DE LA VIRINO

Kiam la ĉiopova Mahadeva kreis la belan Hinduĵon, li deflugis sur la teron, por ĝin admiriri. De lia flugo ekleviĝis sin varma bonodora vento. La fieraj palmoj klinis antaŭ Mahadeva siajn suprojn, kaj ekfloris sub lia rigardo la puraj, blankaj, delikataj, aromaj lilioj. Mahadeva deŝiris unu el la lilioj kaj ĵetis ĝin en la lazuran maron. La vento ekŝancelis la kristalan akvon kaj enkovris la belegan lilion per blanka ŝaŭmo. Minuto – kaj el tiu ĉi bukedo de ŝaŭmo ekfloris la virino – delikata, bonodora kiel la lilio, facila kiel la vento, ŝanĝa kiel la maro, kun beleco brilanta kiel la ŝaŭmo mara, kaj rapide pasanta kiel tiu ĉi ŝaŭmo.

La virino antaŭ ĉio ekrigardis en la kristalajn akvojn kaj kriis, "Kiel mi estas belega!"

Poste ŝi ekrigardis ĉirkaŭen kaj diris, "Kiel la mondo estas bela!"

La virino eliris sur la bordon seka el la akvo (de tiu ĉi tempo la virinoj ĉiam eliras sekaj el la akvo).

Je la vido de la virino ekfloris la floroj sur la tero, kaj el la ĉielo sur ŝin ekcelis milionoj da scivolaj okuloj. Tiuj ĉi okuloj ekbrilis per ekstazo. De tiu ĉi tempo lumas la steloj. La stelo Venus ekbrulis per envio – pro tio ĝi lumas pli forte ol multaj aliaj.

La virino promenadis tra belegaj arbaroj kaj herbejoj, kaj ĉio silente estis ravita de ŝi. Tio ĉi ekenuigis la virinon. La virino ekkriis, "Ho, ĉiopova Mahadeva! Vi kreis min tiel bela! Ĉio estas ravita de mi, sed mi ne aŭdas, ne scias pri tiuj ĉi ravoj, ĉio estas ravita silente!"

Ekaŭdinte tiun ĉi plendon, Mahadeva kreis sennombrajn birdojn. La sennombraj birdoj kantadis ravajn kantojn al la beleco

## THE ORIGIN OF WOMAN

When the almighty Mahadeva created beautiful India, he flew down upon the earth in order to admire it. From his flight there was raised a warm, fragrant wind. The proud palms bent their tops before Mahadeva, and under his glance suddenly blossomed the pure, white, delicate, aromatic lilies. Mahadeva plucked one of the lilies and threw it into the azure sea. The wind began to toss the crystal water and enveloped the beautiful lily with white foam. A minute – and from out of this bouquet of foam bloomed woman – delicate, fragrant as the lily, light as the wind, changeful as the sea, with a beauty shining and sparkling as the foam of the sea, and as rapidly passing as this foam.

The woman first of all looked into the crystal waters and exclaimed, "How very beautiful I am!"

Afterwards she looked all around and said, "How beautiful the world is!"

The woman came out dry from the water onto the shore (since this time women always come out dry from the water).

At the sight of the woman the flowers blossomed on the earth, and from the sky there was turned upon her millions of curious eyes. These eyes blazed with ecstasy. From this time the stars continue to shine. The star Venus burned with envy – because of that it shines more brightly than many others.

The woman walked through beautiful forests and meadows, and everything was silently charmed by her. This began to bore the woman. The woman exclaimed, "Oh, almighty Mahadeva! You created me so beautiful! Everything is delighted with me, but I hear not, know not about those delights, because everything is charmed in silence."

Having heard this complaint, Mahadeva created numberless birds. The numberless birds sang rapturous songs to the beauty of the beau-

de la belega virino. La virino aŭskultis kaj ridetis. Sed post unu tago tio ĉi ŝin tedis. La virino ekenuis.

"Ho, ĉiopova Mahadeva!" ek-kriis ŝi, "al mi oni kantas ravantajn kantojn. En ili oni parolas, ke mi estas belega! Sed kia beleco tio ĉi estas, se neniu volas min ĉirkaŭpreni kaj karese sin alpremi al mi!"

Tiam la ĉiopova Mahadeva kreis la belan, fleksan serpenton Ĝi ĉirkaŭprenadis la belegan virinon kaj rampis apud ŝiaj piedoj. Duontagon la virino estis kontenta, poste ekenuis kaj kriis, "Ha, se mi efektive estus bela, aliaj penus min imiti. La najtingalo kantas belege, kaj la kardelo ĝin imitas. Kredeble mi ne estas jam tiel bela."

La ĉiopova Mahadeva por kontentigo de la virino kreis la simion. La simio imitis ĉiun movon de la virino, kaj la virino ses horojn estis kontenta, sed poste kun larmoj ŝi ekkriis, "Mi estas tiel bela, tiel belega! Pri mi oni kantas, oni min ĉirkaŭprenas, rampas apud miaj piedoj kaj min imitas. Oni min admiras kaj min envidias, tiel ke mi eĉ komencas timi. Kiu do min defendos, se oni ekvolas fari al mi de envio malbonon?"

Mahadeva kreis la fortan, potencon leonon. La leono gardis la virinon. La virino tri horojn estis kontenta, sed post tri horoj ŝi ekkriis, "Mi estas belega! Oni min karesas, mi — neniu! Oni min amas, mi — neniu! Mi ne povas ami tiun ĉi grandegan, teruran leonon, por kiu mi sentas estimon kaj timon!" Kaj en tiu ĉi sama minuto antaŭ la virino, laŭ la volo de Mahadeva, aperis malgranda, beleta hundeto.

"Kiel aminda besto!" ekkriis la virino, kaj komencis karesi la hundeton. "Kiel mi ĝin amas!"

Nun la virino havis ĉion, ŝi pri nenio povis peti. Tio ĉi ŝin ekkolerigis. Por ellasi la ko-

tiful woman. The woman listened and smiled. But after only one day this wearied her. The woman began to be bored.

"Oh, almighty Mahadeva!" cried she, "they sing to me fascinating and pleasing songs. In them they say that I am most beautiful! But what kind of beauty is this, if no one wants to embrace me and caressingly press itself to me?"

Then the almighty Mahadeva created the beautiful, sinuous serpent. It embraced the superbly beautiful woman and crawled beside her feet. For half a day the woman was content, then she grew bored and cried, "Ah, if I were really beautiful, others would try to imitate me. The nightingale sings beautifully, and the goldfinch imitates it. It seems possible that I am not yet so beautiful!"

The almighty Mahadeva for the contentment of the woman created the monkey. The monkey imitated every move of the woman, and the woman was content for six hours, but then with tears she began to cry, "I am so beautiful, so very beautiful! They sing of me, they caressingly embrace me, they crawl beside my feet and they imitate me. They admire me and they envy me, so that I even begin to fear. Who therefore will defend me, if they from envy should wish to do me harm?"

Mahadeva created the strong, powerful lion. The lion guarded the woman. For three hours the woman was content, but after three hours she began to cry, "I am most beautiful! They caress me, I — no one! They love me, I — no one! I can not love this big, enormous, terrible lion, for whom I feel only esteem and fear!" And at this same minute, before the woman, in accordance with the will of Mahadeva, there appeared a pretty little dog.

"What a lovable animal!" exclaimed the woman, and began to caress the dog. "How I love it!"

Now the woman had everything, she could ask for nothing. This made her angry. In order to vent her an-

leron, ŝi ekbatis la hundeton — la hundeto ekbojis kaj forkuris; ŝi ekbatis la leonon — la leono ekmurmuregis kaj foriris; ŝi surpaŝis per piedo sur la serpenton — la serpento eksiblis kaj forrampis. La simio forkuris kaj la birdoj forflugis, kiam la virino ekkriis je ili.

"Ho, mi malfeliĉa!" ekkriis la virino, rompante la manojn. "Oni min karesas, laŭdas, kiam mi estas en bona humoro, kaj ĉiuj forkuras, kiam mi fariĝas kolera! Mi sola! Ho, ĉiopova Mahadeva! Je la lasta fojo mi vin petas: Kreu al mi tian ekzistaĵon, sur kiun mi povus ellasi la koleron, kiu ne havus la kuraĝon forkuri de mi kiam mi estas kolera, kiu estus devigita paciencie elportadi ĉiujn batojn!"

Mahadeva enpeniĝis kaj kredis al ŝi — la edzon!

— Tr. A. Grabowski

ger, she started to beat the dog — the little dog let out a yelp and ran off; she began to beat the lion — the lion let out a growl and went away; she stepped on the serpent — the serpent gave a hiss and crawled off. The monkey ran away and the birds flew away, when the woman started to shout at them.

"Oh, unhappy am I!" exclaimed the woman while wringing her hands. "They caress me, praise me, when I am in a good humor, and they all run away when I become angry! I am all alone! Oh, almighty Mahadeva! For the last time I beseech of you: Create for me that kind of a being, upon which I would be able to release my anger, which would not have the courage to run away from me when I am angry, which would be compelled patiently to bear all blows!"

Mahadeva fell to thinking and created for her — the husband!

## ESPERANTISTS FROM GUATEMALA VISIT THE USA

*Consuelo de Sánchez-Latour*, the beautiful and eminent leader of the Guatemala Esperanto Association, has been visiting the USA with her husband, the honorable *Señor de Sánchez-Latour*, and a party of other noted Guatemalans during the first weeks of May. The special occasion of this visit was to accompany the famed poet, editor, and professor *Señora Angelina Acuña*, who was selected by the United Women of America to be honored as the "Woman of the Americas 1960", with tribute and presentation at the Biltmore Hotel in New York City on May 1st. Señora Acuña is also an Esperantist, and is representative of the distinguished persons in Guatemala taught by Señora de Sánchez-Latour. Even the President of Guatemala, a friend of the de Sánchez-Latour family, speaks a bit of Esperanto. Señora de Sánchez-Latour has a long list of accomplishments for Esperanto in Guatemala, and to some extent also in neighboring Costa Rica. The impressive 560-page volume in the interlanguage, "*Esperanto Tra la Mondo*", is one of her achievements. She reports that the government of Guatemala is planning to issue a postage stamp commemorating Esperanto and Dr. Zamenhof. We hope to print a much more comprehensive report on the Guatemala Esperanto Association in a later AE.

*Miss Guatemala*, who came to Long Beach, California, in July last year, to participate in the *Miss Universe* contest (which was won by Miss Japan), speaks Esperanto. She learned it in a class taught by *Señora Consuelo de Sánchez-Latour* in Guatemala City. Incidentally, concerning Esperanto instruction, eight high schools in Guatemala now teach Esperanto under the auspices of the Ministry of Public Education. More than 500 students are enrolled in the Esperanto classes.



# KANTO PRI HIAVATA

Henry W. Longfellow

Tr. Ernest G. Dodge

Redakcia noto: Post la morto de nia samideano Ernest G. Dodge, la Centra Oficejo ricevis de lia familio diversajn paperojn, tradukojn, manuskriptojn, ktp. Inter ili troviĝis la jena traduko de la "Kanto pri Hiavata." S-ro Dodge tradukis pli ol duonon de la tuta angla poemo, kaj ni kun plezuro publikigos lian tradukon en tri aŭ kvar sinsekvaj numeroj de Amerika Esperantisto.

En la "Kanto pri Hiavata" la poeto Longfellow kunmetis diversajn tradiciojn kaj legendojn de la nordamerikaj Indianoj, kaj teksis ilin en unu belan poemon pri la vivo kaj faroj de Hiavata. Li verkis la poemon tiamaniere por ke li povu pli sukcese prezenti la spiritan aspiremon kaj la folkloran fantaziemon de la indiana karaktero. La ritmo de la poemo, kiun oni supozas modelita laŭ la Finlanda epopeo "Kalevala", estas fidele prezentita per la nuna traduko. Tra la poemo la verkinto ofte citas indianajn vortojn por diversaj objektoj — plejparte vortojn el la lingvo de la Oĝibvoj.

## Prologo

Se demandus vi, el kie  
Ĉi legendoj kaj rakontoj,  
Kun odoro de l' arbaro,  
Kun la roso de herbejoj,  
Kirla fumo el vigvamoj,  
Kun fluson' de riveregoj,  
Kun la oftaj ripetadoj  
Kaj resonsonadoj frapaj  
Kvazaŭ tondro inter montoj,

Mi respondus kaj mi dirus:

"El arbaroj kaj la stepoj,  
El lagegoj de l' Nordlando,  
El la lando de Oĝibvoj,  
El la lando de Dakotoj,  
El la montoj kaj la marĉoj  
Kie paŝtas sin l' ardeo,  
La Ŝu-ŝu-gah, inter junkoj,  
Mi ripetos la legendojn  
Kiel ilin mi aŭskultis  
El la bus' de Navadaha,  
Muzikisto, dolĉkantanto."

Se demandus vi, el kie  
Trovis Navadaha tiajn  
Mirrakontojn, tradiciojn  
Tiel fantaziajn, strangajn,  
Mi respondus kaj mi dirus:  
"En arbaraj birdonestoj,  
En loĝejoj de l' kastoroj,  
En la spuroj de l' bizonoj,  
En nestejo de la aglo!

"Kantis ilin stepobirdoj  
Kaj la birdoj de akvejoj  
En marĉland' melankolia;  
Ĉetovek', vanelo, kantis,  
Mahng', kolimbo, ankaŭ kantis,  
Ankaŭ Vava, la ansero,  
Kaj Ŝu-ŝu-gah, bluardeo,  
Kaj la tetro, Muŝkodasa."



Se eĉ plue vi demandus,

"Kiu estis Navadaha?  
Diru nun pri Navadaha,"  
Mi respondus la demandojn  
Rekte per la jenaj vortoj:

"En la valo Tavasenta,  
Verda kaj silenta valo,  
Ĉe akvejoj tre allogaj,  
Hejme loĝis la kantanto,  
Hejme kantis Navadaha.  
Ĉirkaŭ indianvilaĝo

Etendiĝis maizejoj,  
Kaj herbejoj kaj arbaro.  
Kantis la pinarboj altaj,  
Verdaj en somero, blankaj  
En la vintro, ĝemetantaj  
Ĉiam ili, kaj kantantaj.

"Kaj la akvofluojn plaĉajn  
Vi rimarkus tra la valo,  
Pro flusono en printempo,  
Pro la alnoj en somero,  
Pro nebulo en aŭtuno,  
Pro linio nigra vintre.

Apud ili la kantanto  
Hejme loĝis kaj vivadis,  
En la valo Tavasenta,  
Verda kaj silenta valo.

"Tie li pri Hiavata —  
Kantis li pri Hiavata  
Kantojn pri naskiĝo lia,  
Kiel preĝis li kaj fastis,  
Laboradis kaj suferis,  
Por prosper' de l' homaj gentoj,  
Por la bono de la tribo."

Se vi amas la Naturon,  
Sunlumadon sur paŝtejo,  
Belan ombron de arbaro,  
Amas venton en branĉaro,  
Amas pluvon, neĝfaladon,  
Tumultadon de riveroj

Inter vicoj de pinarboj,  
Amas tondron inter montoj,  
Kies vicaj reeĥadoj  
Imitadas flugilbatojn  
De la agloj en aglejo,  
Vi aŭskultu tradiciojn  
Tiujn ĉi imagoplenajn,  
Kanton ĉi pri Hiavata!

Se vi amas la legendojn,  
Kaj la kantojn de popolo,  
Kiu vokas vin de fore,  
Vokas halti kaj aŭskulti,  
Vokas tiel infansimple,  
Ke orelo ne distingas  
Ĉu kantataj aŭ dirataj,  
Vi aŭskultu la legendon  
Tiun ĉi de l' indianoj,  
Kanton ĉi pri Hiavata!

Vi, kun freŝaj koroj simplaj,  
Vi, kredantoj je Naturo  
Kaj je Dio, ke ĉiame  
Ĉies koro estas homa,  
Ke en brustoj sovaĝulaj  
Estas streboj kaj sopiroj  
Por la bon' ne komprenata,  
Ke malfortaj homaj manoj  
Tuŝas en la vivmallumo  
Dekstran manon de la Dio,  
Kaj altiĝas, plifortiĝas,  
Aŭdu la rakonton simplan,  
Kanton ĉi pri Hiavata!

Se vi iam en promenoj,  
Tra kamparaj verdaleoj,  
Kie dornaj barberisoj  
Jen kreskigas ruĝajn berojn  
Sur ŝtonmuro muske griza,  
Haltas vi ĉe tomb' malnova  
Por momenta meditado  
Pri subskribo penlegebla,  
Ne montranta kantoarton,  
Simplaj frazoj kun literoj  
Plenaj de esper' malĝoja,  
Plenkortuŝas pro patoso  
Pri la Nuno kaj Estonto,  
Legu la skribaĵon simplan,  
Kanton ĉi pri Hiavata!

### **Kanto I**

#### **La Paco-Pipo**

Sur la Montoj de la Stepo,  
Sur la granda ŝtonminejo  
De la Pipoŝtono Ruĝa,  
Giĉe-Manito' potenca,  
Mastro de la Vivo, venis  
Al la klifoj de l' minejo,

Staris rekta, kaj alvokis  
Al la triboj kaj nacioj,  
Vokis ilin veni kune.

El la piedmarkoj liaj  
Riverego ekfluegis,  
Saltis en la matenlumon;  
De la rokoj falis, brilis  
Kiel Iskudah', kometo.  
La Spirito, kliniĝante,  
Per la fingro sur herbejo  
Markis serpentume vojon,  
Diris al ĝi, "Tiel fluu!"

El ruĝŝtono de l' minejo  
Rompis li per mano pecon,  
Formis ĝin en pipokapon,  
Ĝin ornamis per figuroj;  
El margeno de l' rivero  
Prenis junkon por piptubo,  
Junkon kun folioj verdaj.  
Kaj la pipon li plenigis  
Per arbŝelo de saliko,  
Ruĝa ŝelo de la arbo.  
Kontraŭ arbareg' apuda  
Spiris li per forta blovo,  
Kunfrotegis arbobrantojn,  
Ĝis el ili flamo saltis.  
Stare rekta sur la montoj,  
Giĉe-Manito' potenca,  
Fumis Kalumet', pacpilon,  
Kiel signon por nacioj.

Kaj la fumo malrapide  
Supreniris tra l' aero  
En trankvila la mateno;  
Jen linio de nigreco,  
Poste densa vaporbluo,  
Poste neĝe blanka nubo  
En la form' de arbosupro  
Ĉiam supren supreniris,  
Ĝis ĉielon ĝi atingis  
Kaj ĉirkaŭe onde ŝvebis.

En la Valo Tavasenta,  
En la Valo de Vajomin,  
En arbar' de Tuskalusa,  
Ĉe la foraj Rokaj Montoj,  
Ĉe la lagoj en Nordlando,  
Ĉiuj triboj ekobservis  
Fumosignon malproksiman,  
La Pukvana'n de l' Pacpipo.

Kaj Profetoj de l' nacioj  
Diris: "Vidu! la Pukvana!  
Per ĉi signo fore, fore,  
Kurba kiel brant' salika,  
Ŝveba kiel man' alvoka,  
Giĉe-Manito' potenca,  
Nun kunvokas homajn tribojn,



Militistojn li kunigas  
Al konsilantejo sia!"

Laŭ riveroj, tra la stepoj,  
Venis viroj militemaj:  
La tribanoj Delavaroj,  
La Mohaŭkoj, la Ĉoktaŭoj,  
La Komancoj kaj Ŝoŝonoj,  
Kaj la Nigrapieduloj;  
Venis la Paŭneoj, plie  
La Omahoj, la Mandanoj;  
Venis la Dakotoj are,  
La Huronoj kaj Oĝibvoj;  
Ĉiuj kunen altiritaj  
Per la signo de l' Pacpipo,  
Al la Montoj de la Stepo,  
Al la granda ŝtonminejo  
De la Pipoŝtono Ruĝa.

Staris ili sur herbejo  
Kun militaj bataliloj,  
Kun la haŭto ŝmirkolora  
Kiel en aŭtun' folioj,  
Kun vizaĝoj ja pentritaj  
Kiel la ĉiel' matena;  
Sin sovaĝe rigardadis  
Kun aspekto de defio;  
En la koro venĝinklino,  
Heredita malamado,  
En la kor' soifo praa  
De la patroj, por la venĝo.

Giĉe-Manito' potenca,  
La kreinto de l' nacioj,  
Vidis ilin kun kompato,  
Amo kaj kompato patra,  
Taksis la koleron, strebon,  
Kiel bruon de infanoj,  
Nur kverelojn de etuloj.

Super ilin li etendis  
Manon plej potenca dekstran  
Por moligi obstinecon,  
Por sanigi korofebzon  
Per la ombro de la mano.  
Vokis li per voĉ' majesta  
Kiel son' de foraj akvoj  
En valegojn faladantaj,  
Konsilante, avertante,  
Alparolis ilin jene:

"Ho infanoj! kompatindaj!  
Aŭdu vortojn de saĝeco,  
Aŭdu dirojn de averto,  
El la lipoj de l' kreinto,  
Lipoj de l' Spirito Granda  
Kaj la Mastro de la Vivo,  
Kiu faris vin vivanta!

"Estas mi al vi doninta  
Akvofluojn por fiŝkapto,

Donis urson kaj bizonon,  
Donis cervon kaj boacon,  
La anason, la kastoron.  
Mi plenigis la riverojn  
Per la fiŝoj ĉiuspecaj.  
Kial do vi malkontentas?  
Kial ĉasas vi la fratojn?"

"Mi laciĝas pri kvereloj,  
Pri militoj, sangoversoj,  
Preĝoj viaj por venĝado;  
Mi laciĝas pri malpacoj  
Viaj, interbatalado.  
Via forto estas tio,  
Ke vi vivu unuece.  
La danĝero via estas  
Ke disiĝu vi malfrate.  
Tial pace vivu de nun,  
Kiel fratoj kunvivadu.

"Mi al vi Profeton sendos,  
Jen Savanto de l' nacioj.  
Estos li gvidanto via  
Kaj la via instruanto.  
Penas li por vi, suferos.  
Se vi sekvos la konsilojn,  
Pli multigos vi, prosperos.  
Se avertojn vi mistraktos,  
Vi forvelkos kaj pereos.

"Banu vin en fluo jena;  
Vi forlavu de l' vizaĝoj  
La militkolorojn viajn,  
For de l' fingroj sangmakulojn;  
Enterigu batalilojn.  
Ruĝan ŝtonon dispecigu,  
Formu ĝin en Paco-Pipojn.  
Junkojn prenu, kaj ornamu  
Per plej helkoloraj plumoj;  
Fumu la pacpilon kune,  
Kiel fratoj de nun vivu."

Teren tiam la bravuloj  
La vestaĵojn cervohaŭtajn  
Ĵetis, kaj la militilojn.  
Saltis ili en la fluson;  
Frote la militkolorojn  
Lavis for de la vizaĝoj.  
Klara super ili akvo  
Fluis klara kaj kristala,  
Fluis el la piedmarkoj  
De la Mastro de la Vivo;  
Nigra sube fluis akvo,  
Malpurega pro la ruĝo,  
Kvazaŭ sango kunmiksita!

El la fluo la bravuloj  
Vadis puraj kaj lavitaj,  
Puraj de l' militkoloroj;  
Siajn klablojn enterigis,



Enterigis batalilojn.  
Giĉe-Manito' potenca,  
Grandspirito, la Kreinto,  
Jen ridetis al infanoj,  
Al senhelpaj idoj siaj.

Kaj silente la bravuloj  
Rompis la rokajon ruĝan,  
Ĝin glatigis, ĝin pluformis  
Kiel kapojn de Pac-Pipoj;  
Rompis ĉe l' rivero junkojn,  
Garnis ilin per la plumoj  
De la birdoj helkoloraj  
Ĉiuj hejmen ekforiris,  
Dum la Mastro de la Vivo  
Supreniris tra la nuboj,  
Tra la pordoj de l' ĉielo,  
Malaperis antaŭ ili  
En la fumo ruliĝanta,  
La Pukvana de l' Pac-Pipo!

## Kanto II

### La Kvar Ventoj

"Hura pro vi, Muĝekivis!  
Estu via la honoro!"  
Tiel kriis la bravuloj,  
Tiel maljunuloj kriis,  
Kiam venis li triumfe  
Kun la sorĉa Vampum-Zono  
El la loko de l' Nord-Vento,  
El la regno de Vabaso,  
Lando de l' Kuniklo Blanka.

Ŝtelis li la Zonon Sorĉan  
For de l' kol' de Miŝe-Mokva,  
Granda Urso de la montoj,  
La teruro de l' nacioj,  
Kiam kuŝis li pezdorme  
Sur la supro de la montoj,  
Kiel roko muskoplana,  
Brune griza pro la muskoj.

Lin silente li alpaŝis,  
Ĝis ungegoj de l' giganto  
Preskaŭ tuŝis lin, tutruĝaj,  
Preskaŭ lin timigis, - ĝis la  
Spiro lia tre varmega  
Banis manojn de l' heroo,  
Dum li tiris Zonon Sorĉan  
De oreloj ne aŭdantaj,  
De okuloj ne vidantaj,  
De nazego kaj naztruoj,  
Nigraj, grandaj la naztruoj.  
Pezspirado ja varmigis  
Manojn du de Muĝekivis.

Tiam ŝvingis li la klabon,  
Kriegante militvokon,  
Frapis fortan Miŝe-Mokva'n,

Frapis meze de la frunto,  
Frapis inter la okuloj.


Pro la frapo, kapturniĝe,  
Granda Urso de la montoj  
Staris, sed genuoj tremis;  
Plendploretis li virine,  
Dum li ŝanceliĝe stumblis,  
Reeksidis sur la koksoj.  
Kaj la brava Muĝekivis  
Antaŭ li sentime staris,  
Alridaĉis lin mokvorte,  
Alkriegis lin fifraze:

"Urso! Vi, la malkuraĝa,  
Vi pretendis esti brava!  
Sed vi ploras, plendploretas  
Kvazaŭ estas vi virino!  
Urso! Niaj triboj longe  
Ĉiam inter si militas;  
Nun, trovinte nin pli fortaj,  
Vi ŝteliras tra l' arbaro,  
Inter montoj vin forkaŝas.  
Se vi estus min venkinta,  
Mi nenian ĝemon spirus.  
Sed vi, Urso, side ploras,  
Malhonoras vian tribon  
Kiel virinaĉ' maljuna,  
Malkuraĝa aĉa ino!"

Militklabon li relevis,  
Refrapegis Miŝe-Mokva'n  
En la mezo de la frunto;  
La kranion li frakasis  
Kiel oni fiŝkaptante  
Rompas vintre la glacieron.  
Tiel mortis Miŝe-Mokva,  
Granda Urso de la montoj,  
La teruro de l' nacioj.

"Hura pro vi, Muĝekivis!"  
Kriis hurle la popolo,  
"Estu via la honoro!"  
L' Okcidenta Vent' vi estu!  
Havu poste kaj ĉiame  
Regnon super ĉiuj ventoj  
Sub plafono de l' ĉielo.  
Ne nomigu Muĝekivis  
Plu, sed Okcidenta Vento!"

Tiel iĝis Muĝekivis  
Patro de l' ĉielo-ventoj.  
Li konservis, kiel propran,  
Venton de la Okcidento;  
Kaj la ventojn la ceterajn  
Donis li al siaj filoj:  
Orientan, li, al Vabun;  
Sudan, li, al Ŝavondasi;  
Kaj la Nordan, krueleĝan,  
Donis al Kabibonoka.



Belaspektis juna Vabun,  
 Alportanto de mateno.  
 Liaj argentecaj sagoj  
 Ĉasis la mallumon foren,  
 Trans la montoj, trans la valoj.  
 Hele karmezinaj strioj  
 Kolorpentris liajn vangojn.  
 Lia voĉ' vilaĝon vekis,  
 Cervojn kaj ĉasistojn vokis.

En ĉiel' solecis Vabun,  
 Kvankam birdoj kantis al li,  
 Kvankam floroj de l' herbejo  
 Ĉie bonodoris por li,  
 Kaj arbaroj kaj riveroj  
 Kantis je alveno lia,  
 Kantis kaj ĝojkriis por li;  
 Tamen lia kor' en brusto  
 Malgajigis, ĉar li estis  
 Tute sola en ĉielo.

Foje en la frumateno  
 Al la tero rigardante,  
 Dum vilaĝ' ankoraŭ dormis  
 Kaj nebul' sur la rivero  
 Ŝvebis, kvazaŭ noktantomo  
 Forfuĝanta la tagiĝon,  
 Li ekvidis junulinon  
 Tute solan sur herbejo,  
 Akvokanojn ŝi kolektis  
 Ĉe rivero junkoplena.

Je mateno sur la tero  
 La unua vidataĵo  
 Estis ŝiaj du okuloj  
 Bluaj, rigardantaj liajn,  
 Bluaj kiel du lagetoj  
 Briletantaj inter junkoj.  
 Amis li la solulinon;  
 Ŝi atendis lian venon,  
 Ĉar solecis ili ambaŭ,  
 Ŝi surtere, li ĉiele.

Ŝin li ĉiam amindumis  
 Per karesoj, per rideto  
 De sunlumo, amindumis  
 Per flatantaj amovortoj,  
 Per ĝemetoj kaj kantado,  
 Dolĉa flustro en branĉaro,  
 Plej molsona ventmuziko,  
 Plej dolĉegaj florodoroj,  
 Ĝis al brusto ŝin li logis,  
 En purpuraj roboj faldis,  
 Ĝis li ŝanĝis ŝin al stelo,  
 Tremetanta eĉ ankoraŭ  
 Sur ĉiela brusto lia.  
 Ĉiam en ĉielo oni  
 Vidas ilin kunmarŝantaj,  
 Vabun, kaj la Vabun-Anung,



Vabun, kaj Matena Stelo.

Sed kruela Norda Vento,  
 Norda Vent', Kabibonoka,  
 Logis inter glacimontoj,  
 Neĝamasoj ĉiam daŭraj,  
 En la regno de Vabaso,  
 Lando de l' Kuniklo Blanka.  
 Pentris li en la aŭtuno  
 Ĉiujn arbojn per skarlato,  
 Kaj foliojn ruĝaj, flavaj;  
 Lia spir' neĝerojn sendis,  
 Falajn, siblajn tra l' arbaro;  
 Froststonigis li lagetojn,  
 Kaj la lagojn, la riverojn.  
 Suden li kolimbon pelis,  
 Mevon, kaj la kormoranon,  
 Kaj longbekan numenion,  
 Al nestajoj inter algoj  
 Kaj aliaj marĉkreskaĵoj  
 En la land' de Ŝavondasi.

Foje el la neĝterasoj,  
 Sia hejmo glacimonta,  
 Kruda li, Kabibonoka,  
 Iris for, kaj liaj haroj  
 Neĝkovritaj post la dorso  
 Fluus kiel rivereto,  
 Kiel nigra, vintra fluo,  
 Dum li suden hurle flugis  
 Super frostaj lagoj, marĉoj.

Tie inter kanoj, junkoj,  
 Ŝingebis'on, plunĝbirdulon,  
 Trovis li trenantan post si  
 Multajn fiŝojn per la ŝnuro,  
 Sur la marĉoj froste firmaj,  
 Postrestantan en marĉejoj,  
 Kvankam liaj samrasuloj  
 Longe estis flugmigrintaj  
 Al la land' de Ŝavondasi.

Kriis do Kabibonoka,  
 "Kiu min kuraĝas spiti?  
 Resti nun en mia regno,  
 Kiam Vava jam forflugis,  
 La sovaĝanser' jam iris,  
 Kaj l' ardeo, la Ŝu-Ŝu-gah,  
 Suden jam de longe iris?  
 Mi eniros la vigvamon  
 Lian kaj per blov' estingos  
 Lian fajron bruletantan!"

Nokte jen Kabibonoka  
 Venis hurle kaj lamente;  
 Ĉirkaŭ la vigvam' la neĝon  
 En terasojn li blovpuŝis,  
 Kriis tra la fumotruo,  
 Stangojn furioze skuis,  
 Frapsonigis pordkurtenon.

Ŝingebis', plunĝisto brava,  
 Eĉ ne timis, nek atentis;  
 Ŝingebis', plunĝisto, havis  
 Kvar ŝtipegojn por brulligno  
 Dum la lunoj kvar de vintro;  
 Kaj por liaj manĝoj fiŝojn.  
 Ĉe la fajro li sidadis,  
 Varma, gaja kaj manganta;  
 Kantis, "Ho, Kabibonoka!  
 Mia kunmortul' vi estas!"

Jen! Kabibonoka ene;  
 Ŝingebis', plunĝisto, sentis  
 La ĉeston per la frosto,  
 Malvarmega lia spiro;  
 Sed ne ĉesis li kantadon,  
 En ridado li ne paŭzis,  
 Nur la ŝtipon li ekturnis,  
 Nur la fajron pli heligis;  
 Kaj ŝvarmego da fajreroj  
 Supren tra l' fumtruo kirlis.

Falis de Kabibonoka,  
 De la frunto kaj hararo,  
 De la neĝkovritaĵo haroj,  
 Ŝvitgutegoj multaj, grandaj,  
 Per truetoj markis cindrojn,  
 Kiel de vigvamosupro,  
 Kaj de l' abiarbranĉaro  
 Falas degelanta neĝo  
 En printempo, kaj estigas  
 Truojn en la neĝtavoloj.

Ĝis finfine li starigis;  
 Li ne povis plu toleri  
 Varmon, ridon, nek gajkanton  
 Li venkite elkuregis,  
 Piedfrapis neĝterasojn,  
 Piedfrapis lagojn, fluojn,  
 Pli la neĝon malmoligis,  
 Glacikovron pli dikigis;  
 Vetdefiis Ŝingebis'on,  
 Plunĝbirdulon, nun elveni,  
 Ke li nuda luktu kun li  
 Sur la frostiĝintaj stepoj,  
 Sur glacio de la marĉoj.

Ŝingebis' eliris, luktis  
 Kun Nord-Vento tra la nokto,  
 Luktis nuda sur la stepo  
 Kun Kabibonoka kruda,  
 Ĝis spirego ties svene  
 Mallaŭtiĝis, ties frosta  
 Manpremego malfortiĝis,  
 Ĝis li malantaŭen stumblis  
 Kaj venkite retroiris  
 Al la regno de Vabaso,  
 Lando de l' Kuniklo Blanka,  
 Dum ankoraŭ ja li devis



Aŭdi gajan mokridadon,  
 Kiam Ŝingebis', plunĝisto,  
 Kantis, "Ho, Kabibonoka!  
 Kunmortul' vi estas nure!"

Ŝavondasi, graskorpulo,  
 Ŝavondasi, malagema,  
 Logis fore en Sud-Lando,  
 En sunlumo songsimila,  
 En somero ĉiam daŭra.  
 Sendis li arbarbirdojn,  
 La Opeĉi, ruĝan turdon,  
 La Ovajsa, bluan birdon,  
 Kaj la Ŝoŝo, la hirundon;  
 Li la Vava'n, la anseron,  
 Retrosendis norden, sendis  
 La melonojn kaj tabakon,  
 Kaj purpurajn vinberarojn.

Fumo el la pipo lia  
 La ĉielon filmbluigis,  
 La aeron songemigis,  
 Donis brilon al la akvo,  
 Nebulecon al montetoj;  
 Li la Indian-Someron  
 Mole dolĉan alportadis  
 Al la Norda Land' malgaja  
 Dum la Luno de Neĝŝuoj.

Malzorgema Ŝavondasi!  
 En la viv' nur unu ombron  
 Havis li, ĉagrenon unu.  
 Foje, rigardante norden,  
 Li ekvidis junulinon,  
 Fore sur la step' starantan;  
 Alta ŝi, kaj tre gracila,  
 Tute sola sur la stepo;  
 Hele verdaj – ŝiaj vestoj;  
 Sunlum-flavaj – ŝiaj haroj.

Ŝin li daŭre rigardadis;  
 Pro pasio li ĝemspiris;  
 Lia kor' de tag' al tago  
 Pli kaj pli varmigiis pro la  
 Amo kaj sopiro lia  
 Al la fora junulino,  
 Kun la sunoflavaj haroj.  
 Sed tro grasa, malagema,  
 Estis li por amindumo;  
 Ŝin li nure rigardadis,  
 Side ĝemis pro pasio  
 Al la junulin' sur stepo.

Fine, rigardante norden,  
 Li ekvidis ŝiajn harojn  
 Ne plu flavaj, tute blankaj.  
 Ĉu kovritaĵo per neĝeroj?  
 "Ha! la frato el Nordlando,  
 El la regno de Vabaso,  
 Lando de l' Kuniklo Blanka,

Certe ŝtelis la knabinon!  
Vi la amatinon ŝtelis,  
Vi la manon sur ŝin metis,  
Vi ŝin amindumis, gajnis,  
Per rakontoj pri Nord-Lando!"

Do malgaja Ŝavondasi  
Ĉagrenegon elspiradis,  
Kaj la Suda Vento vagis  
Varma sur la stepo, kun la  
Amgemad' de Ŝavondasi,  
Ĝis l' aero ŝajnis plena  
De neĝeroj – kardosemoj  
Blove ŝvebaj sur la stepo.  
Kaj la junulin' kun haroj  
Sunlumece flavkoloraj  
Malaperis por ĉiame.  
Ne plu vidis Ŝavondasi  
La flavharan junulinon!



Ho, trompita Ŝavondasi!  
Ne hominon vi rigardis,  
Ne knabinon vi sopiris,  
Estis stepa leontodo;  
Ĝin tra tuta la revema  
Somertempo vi rigardis,  
Ĝin priĝemis vi pasie,  
Ĝin per spiro vi forblovis  
Por ĉiame; en aeron  
Ĝin vi blovis, ĝemspirante,  
Ha! malsprita Ŝavondasi!

Tiel ventoj dividigis.  
Filoj tri de Muĝekivis  
Trovis lokojn en ĉielo  
Ĉe l' anguloj de l' ĉielo;  
Nur la Okcidentan Venton  
Memposedis plej fortega  
Ventopatro, Muĝekivis.

## DEZIRAS KORESPONDI

Anoncoj: Eksterlande, unu vorto aŭ mallongigo por unu cendo, (resp. kulp. valoras dek cendojn). Enlande, unu vorto por du cendoj. Abonanto aŭ membro, anonco senpage. Komerca anonco, unu vorto por tri cendoj.

- Indonezio.** F-ino Rose R. Hoetono, Natajudan 273, Jogjakarta. 22-jara studentino dez. interŝangi leterojn kaj il. PK, interesiĝas pri muziko, kantado, naĝado kaj PM, ankaŭ serĉas korespondantojn por aliaj membroj de la Indonezia Esperanto-Asocio en Jogjakarta.
- Italujo.** F-ino Katia del Noce, Instituto SISEC, Piazza S. Pietro 3, Trapani, Italujo. 17-j. knabino dez. interŝangi il. PK. Sendu bildkarton de via urbo, kaj mi tuj respondos reciproke.
- Japanujo.** F-ino Kaoru Haruna, Nara Virina Universitato, Kita-uoya-nishi-Machi, Nara-City, Japan. 19-jara studentino, prezidanto de Esperantoklubo de 30 fraŭlinoj, kiuj dez. kor. kun ĉiuj landoj.
- Japanujo.** S-ro Morishige Yoshitoka, Akituĉo Mitumati 43754, Toyotagun, Horoshima-ken. 20-j. knabo dez. kor. kun samaĝaj knabinoj.
- Kanado.** Michael Butler, Box 189, Brooklin, Ont., Canada. 14-jara knabo dez. kor. kun junuloj proksimume samaĝaj.
- Koreo.** S-ro Ki Heng Kim, c/o Chin Song Kim, 732-6 Nam San Dong, Taegu, Korea. 22-j. studento de Eduka Kolegio, vicprezidanto de Korea Junulara Esp-Asocio, dez. kor. kun la tuta mondo, speciale kun Usono, Brazilo, Japanujo kaj Eŭropaj landoj, iŝ. il. PK kaj fotojn.
- Koreo.** S-ro Woan Se Rhee, Nam San-dong 5-ku 3 ban 600, Taegu, Korea. 21-jara studento de Universitato, dez. kor. kun ĉiuj landoj.
- Libano.** F-ino Astrid Tcherkezian, 39 Assamani St., Beirut, Lebanon. 18-jara junulino dez. kor. kun gejunuloj ĉie, speciale interesiĝas pri sporto, teatro, vojaĝado, kaj kolektas poŝtmarkojn.
- Usono.** S-ro Gordon Bordow, 3450 Iowa Ave., Fresno 2, Calif. Dez. kor. ĉiuj landoj, ĉiuj temoj, kaj kun ges-roj en la kampo de labor-sindikatoj.
- Usono.** S-ro William W. Kennedy, 4223 Williamson Place, Cincinnati 23, Ohio. Komencanto dez. kor. kun ĉiuj landoj, per il. PK kaj leteroj.
- Usono.** Ges-roj Edward Sherman, 6855 Geyser Ave., Reseda, Calif. Dez. kor. kun gesamideanoj kiuj havas 35-40 jarojn, pri studado de la Biblio (speciale antikvaj dokumentoj), radio, fotografado, kamploĝado.

## "SAY IT IN ESPERANTO"

by G. Alan and Doris T. Connor

*Tells You What to Say and How to Say it!*

You'll be delighted by the ease with which you'll immediately be saying whole phrases in Esperanto. Practice ordering meals, renting rooms, driving a car, going to a doctor, going shopping, etc., by using this handy manual.

5 1/4 x 3 1/2 in. for purse or pocket. Over 1000 phrases, many never before translated into Esperanto. A complete index with unique numbering system so that you find the phrase you want instantly. A quality product with strong covers and sewn back. A guide to conversation, with summary of grammar. Useful in Esperanto courses.

*It is a thoughtful, useful gift for friends, too!*

Those who receive it will find much interest in learning to say useful phrases in Esperanto; and will want to go on to a mastery of the interlanguage. Order them in quantity!

*Price only 75¢ each, discounts to groups & dealers.*

*Published by Dover Publications, Inc. Order from EANA.*



only  
75¢

---

## LINGUAPHONE HOME STUDY COURSES

You can learn *ESPERANTO*, or any other language listed below, by the world-renowned *Linguaphone* Ear-Eye Method. Order through the *Esperanto Book Service* for benefits to both yourself and your Esperanto Central Office. You may select:

Esperanto	Russian	Swedish	Persian
Italian	Finnish	Hebrew	Hausa
Irish	Arabic	Bengali	Spanish
Polish	Japanese	Greek	Dutch
Chinese	Latin	German	Afrikaans
Malay	French	Czech	Hindustani
English	Portuguese	Norwegian	Effik

Regular list price for *Esperanto*, complete course, is \$57.50. Most other languages are priced the same. A few higher, a few lower — dependent upon number of records and other factors. Write to *Esperanto Book Service* about any language in which you are interested. Special payments for members of EANA.

---

**Esperanto Ass'n of N. A., 114 W. 16 St., New York 11, N. Y.**